

Intervjuo kun Giorgio Silfer pri la establotekniko

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-838/319, 1979 novembro 01 kaj 03

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-48->

[/Radioprelego_838_SRI_319_1979_11_01_03_Intervjuo_kun_Giorgio_Silfer_pri_la_establotekniko.mp3](http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-48-/Radioprelego_838_SRI_319_1979_11_01_03_Intervjuo_kun_Giorgio_Silfer_pri_la_establotekniko.mp3)

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia sinjoro Claude Gacond. Mi hodiaŭ havas la honoron intervui sinjoron Giorgio Silfer, kiu planadis la somerajn kursojn de Internacia FERIA Altlernejo (IFA) en La Chaux-de-Fonds. Interalie, li planadis kurson pri la temo establotekniko. Sinjoro Giorgio Silfer, ĉu vi povas difini tiun ĉi temon 'establotekniko':

GS.- "Establo" estas vorto enkondukita de Zamenhof: ĝi signifas "daŭre funkcia organizaĵo". Do religia eklezio, politika partio, ekonomia entrepreno, kultura societo, futbala teamo, se rigardataj el organiza vidpunkto, estas establoj. La ŝtato mem estas konsiderebla kiel stablo. La kurso celis respondi al la demandoj:

1-e kiaj establoj ekzistas nuntempe;

2-e kiel fondi kaj aranĝi organizon por ke ĝi povu funkcii kaj daŭri.

Cl.- Laŭ vi, ĉu ekzistas baza koncepto por klasigo de la diversaj establoj, nome kiu estas la fundamenta nocio por kompreni la naturon de kiu ajn stablo?

GS.- Ordinare la plej grava afero, por la transiro el la fazo de spontana iniciato al la fazo de vivopova organizaĵo, estas trafe respondi al la demando "Kiu rajtas kion?". Tiu difino de rajtoj, respektive devoj, estas necesa por la naskiĝo de stablo. E1 tiu difino devenas alia demando: ĉe kiu la reganto(j) respondecas pri siaj faroj? ĉar evidente la minimuma strukturo de ĉiu stablo antaŭvidas plenuman kaj norman povojn, indikante en la kontrolinstanco la elementon kun norma povo.

Cl.- Ĉu vi povus fari kelkajn ekzemplojn pri tiu fundamenta nocio?

GS.- Mi citas du ekstremajn ekzemplojn. En la stablo nomata "absoluta monarkio" la reganto (nomata reĝo aŭ imperiestro) respondecas ĉe Dio, de kiu venas lia povo. Tio praktike signifas, ke la reganto respondecas ĉe neniu pri siaj faroj, sed li almenaŭ ne devas ĝeni la pastran potencon. El tiu nura interparolanto (en Eŭropo nomata eklezio) povas veni problemoj: tial leviĝis la granda konflikto inter papoj kaj imperiestroj, dum la mezepoko. En la stablo nomata "demokrata partio", aŭ en alia nomata "demokrata asocio", la regantoj (nomataj Estraro) respondecas al la ĝenerala asembleo, do al ĉiuj membroj - estas ĝuste la mala kazo de absolutismo.

Cl.- Ĉu oni povas diri ke demokratio estas ĝenerale utila aŭ malutila al bone funkcia organizaĵo?

GS.- Mi opinias, ke estas pli facile labori kiel funkciulo en diktaturo ol en demokratio: mi diras tion el strikte organiza vidpunkto. En demokrata grupo, la funkciulo devas esti ĝenerale pli preparita, ĉar lia posteno dependas de ĝenerala kontrolo, kaj li povas ricevi premojn de ĉiuj flankoj, kaj ne estas facile kontentigi ĉiujn. Tial okazas ke, se popolo konas historian fazon de rapida industriigo de la lando, tio okazas samtempe kun la politika regado de unupartia sistemo: ĉar industriigo postulas eksterordinaran socian ordon, kaj tre malofte ekzistas popolo tiom memdisciplina, ke la socia ordon oni garantias per demokrata sistemo.

Cl.- Ni aŭdis ĝis nun nur kelkajn ampleksajn kaj ekstremajn aplikojn de via tre interesa establoteknika analizo. Ĉu vi povus fari kelkajn pli simplajn ekzemplojn, eventuale per la Esperanto-movado?

GS.- Tial ke ni troviĝas en Svislando, mi volas esplori la fenomenon "La Chaux-de-Fonds". En tiu urbo ekzistas pluraj establoj kiuj rilatas al la internacia lingvo, kaj ni povas distingi ilin laŭ diversaj blokoj, surbaze de la respondo al la fundamenta demando "ĉe kiuj la regantoj respondecas pri siaj faroj?".

Unua bloko estas tiu de Centro por dokumentado kaj studo pri lingvo internacia, CDELI, kaj de Fonds Edmond Privat, FEP, du sekcioj de la Urba Biblioteko. La povo estas ĉe la arkivestro, kiu respondas al la estraro de CDELI, respektive de FEP; sed tiuj arkivestroj tamen havas la statuson de kunlaborantoj de la Biblioteka Direktoro. De kiu dependas la direktoro? Siavice li dependas de la urba registaro. Do ĉi tiuj du establoj, CDELI kaj FEP, strukturiĝas laŭ la modelo de publika biblioteko.

Dua bloko estas la tradicia Esperanto-movado. En Ĉaŭdefono troviĝas du tiaj establoj: la loka Esperanto-klubo kaj la svisa sekcio de ILEI. Ilia strukturo analogas al tiu de demokrata partio aŭ eklezio: ili havas estraron kiu devenas el ĝenerala asembleo kaj respondas al la tuta membraro.

Tria bloko estas tiu de la privataj entreprenoj. En Ĉaŭdefono troviĝas du privataj entreprenoj: MUZIKA ELDONEJO, posedata de Olivier Tzaut, kaj LITERATURA FOIRO (LF). Dum MUZIKA ELDONEJO estas plene profitcela, LF paŭzas la strukturon de plurnacia koncerno, sed ne havas profitajn celojn: ĝi tuj investas la gajnojn en novajn kulturajn servojn al la esperantistaro. En LF la povo estas ĉe la ĉefredaktoro, kiu respondas al la Administra Konsilantaro (AK). Siavice la AK konsistas el du partoj: dumvivaj membroj (la sepopo de "La Patrolo", kiu fondis la revuon) kaj elektitaj membroj. Tiuj ĉi lastaj reprezentas la redaktorojn kaj la stabanojn, do la diversajn funkciulojn. Sed mankas iu ĝenerala asembleo, ĉar LF estas privata entrepreno, do ne movado kun membraro.

La plej interesa bloko da institucioj ĉaŭdefonaj estas la kvara. En la kvara bloko ni klasigas Kulturan Centron Esperantistan (KCE). La povo estas ĉe la Direkta Komitato (DK), kiu respondecas ĉe la Asembleo de la apogantoj kaj aliĝintaj societoj; sed tiu Asembleo fakte estas forte disciplinita. Praktike, nur la aliĝintaj societoj povas trudi al la DK decidon kiu malplaĉas al la DK mem, kaj tio tra la kanalo de la Kultura Komisiono

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond intervjuis Giorgion Silber pri la temo 'establotekniko'. Ĝis reaŭdo!